

Hermann Löns,
Erikejaj betuloj

tradukita de Joachim Gießner

Erikejaj betuloj en freŝverda hel',
la genist' orbrilas kiel flam',
gaje trilas alaŭdoj sub alta ĉiel',
ĉiu tetro glugluas pro am'.

La rigardo migradas kun miro kaj ĝu'
tra marĉa, blankfloka belec',
sur l'erika flormar' sub lazura blu',
kaj ĝi ŝvebas al ĉiela altec'.

Al la blua ĉiel', kie vagas nubet'
kiel silkmalpeza lanflok'.
El la koro elsonas etera kantet',
kiu flugas al ĉielalta lok'.

Delikata kant', tenera kant',
kiel filigrana arĝent',
kiel nuboj migranta jen super la land',
kiel lanfloketo en vent'.

*Traduko de la Germana poemo "Alle Birken grünen" de HERMANN LÖNS (*1866-08-29 – †1914-09-26) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (*1913-12-23 – †2003-11-25).*

Arg-619-1251 (2012-10-19 23:24:27)

Tiu ĉi poemo troveblas en <http://www.esperanto.de/kantoj/kantoj.pdf>. Pri Joachim Gießner vidu: http://eo.wikipedia.org/wiki/Joachim_Giessner. La melodio - verkita de Ernst Licht - estas aŭdebla en <http://ingeb.org/Lieder/allebirk.html>.